

Gazeto




Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

San Roque

(Kadizo)

37-a Jarkolekto - Decembro 2023 - N-ro 131



Oktobero / Decembro 2023

Enhavo

- P. 03 Esperanto en Andaluzio.**
- P. 07 La "sevilano" kiu evitis la almeton de Hispanio al la Unua Mond-milito.**
- P. 11 Lingva Angulo:**
Verbos que no llevan objeto directo.
- P. 16 Poezia Angulo.**
- P. 17 Nuntempa Vortaro:**
Andaluziaj foiroj.
- P. 20 Folioj por Praktikado.**
- P. 24 Turismi en ...**
San Roque (Kadizo).
- P.27 Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio:** *José de la Torre y del Cerro, la kordova arĥivisto.*
- P. 30 $E=mc^2$ Scienca Angulo:**
Atakoj de orkoj en la Gibraltara Markolo.
- P. 32 Flamenko:**
Corruco de Algeciras.
- P. 34 Fervojista angulo:** *La fervoja linio en la Parko "El Alamillo" en Sevilo.*
- P. 36 Komikso:**
Malpliigu la konfid-ekspluaton!
- P. 43 Nun Ni. Junularaj Paĝoj.**
- P. 49 Andaluzia kuirarto:**
La almeria "Tabernero".
- P. 51 Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio:** *Gasparilla, la sevila pirato.*
- P. 53 Vorto-ludoj.**

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruiz, en San Fernando (Cádiz) en 1910. Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto

REDACCIÓN: C/ Ánfora 6 5-D
29013 Málaga (Hispanio)

DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86.
ISSN: 1576-0618.

DIRECTOR: Ángel Arquillos López

REDACTORES:

José María Rodríguez Hernández
Alejandro Burgos Escalante



Sur la kovrilo:

Vilaĝo San Roque, fone la Gibraltara Rokego.

ESPERANTO EN ANDALUZIO

ESPERANTO-KURSO DE LA GIMNAZIO ALMENARA EN VÉLEZ-MALAGA DAŬRE FURORAS EN AMAS-KOMUNIKILOJ

Sur la pasinta numero de nia revuo ni jam informis pri tre bona akcepto ĉe amas-komunikiloj de la kurso de esperanto organizata de la profesoro Fabián Jimenez en la Gimnazio Almenara en Vélez Malaga. La intereso de ĵurnalistoj daŭras, do oni proponis al Fabián intervjuon en la nacia televido 13-TV. Ĝi okazis la pasintan 4-an de aprilo 2024, la etoso kaj la komentoj estis favoraj al nia lingvo.



Jen momento dum la televida intervjuo al Fabián Jiménez en 13-TV. Verdire, oni informis, ke *Gimnazio en Malago revivigas esperanton*, kvankam oni devas diri, ke feliĉe nia lingvo neniam mortis.

FRANCA ESPERANTISTO VIZITIS MALAGON

Franca esperantisto, Thierry Spanjy vizitis Malagon la pasintan monaton aprilon. Esperantistoj el la urbo akceptis lin, jen bona okazo por gustumi bieron kaj babili en esperanto, kompreneble en la kafejo "Esperanto" en Malago.



RENOVIGITA LA TTT-PAĜO DE AEU EN INTERRETO

Antaŭ kelkaj monatoj, AEU devis nuligi sian ĉeeston en interreto pro abunda kaj terura ricevo de spamaĵoj. Feliĉe, la afero solviĝis kaj ni jam povas anonci, ke nova TTT-paĝo de la andaluzia E movado ekzistas en la reto. La ret-adreso kiel kutime estas *esperanto.ac*. Ĉi tiu ret-loko plenumas la duoblan celon de la andaluzia E-asocio, tio estas: sciigi la andaluzojn pri kio estas esperanto kaj la esperantistaron pri Andaluzio.

Tiel, estas eble trovi sur la paĝaro informojn pri esperanto, kursojn por lerni la lingvon aŭtodidakte, kelkajn lingvajn ludojn por havi sufiĉan vortostokon kaj ankaŭ informojn pri la historio, naturo kaj kulturo de Andaluzio.

Alia celo de la TTT-paĝo estas konstrui bitotekon de nia revuo, tiel ni deziras aperigi pdf-version de ĉiuj ekzempleroj de *GAZETO ANDALUZIA*. Ĉi tiu afero ankoraŭ ne tute pleniĝis, kvankam jam estas eble legi dekojn da numeroj. Sendube tio estos bona rimedo por ontaj esploroj pri la historio de la andaluzia movado.

Do, vi ĉiuj estas invitataj viziti ofte nian TTT-paĝon *www.esperanto.ac* Ni klopodos enirigi ofte novajn legindaĵojn.

www.esperanto.ac



En Andalucía un grupo de personas habla esperanto y se ha propuesto difundirlo.

Aspekto de la nova TTT-paĝo de Andaluza Esperanto-Unuiĝo

FORPASIS MARÍA DE LOS ÁNGELES INFANTE

La pasintan 4-an de aprilo forpasis María de los Ángeles Infante, filino de Blas Infante -Patro de la Andaluza Patr-lando-. Ŝi estis prezidanto de la Fondaĵo "Blas Infante" kaj ekde la 70-aj jaroj, kiam denove oni rajtigis politikajn partiojn en Hispanio, ŝi diskonigis la politikan kaj kulturen vivojn de sia patro.

Kiel sciante, Blas Infante estis esperantisto, do, María de los Ángeles neniam hezitis paroli pri la esperantisteco de sia patro, ŝi eĉ ĉeestis la malfermon de la 44-a Hispana Kongreso de Esperanto, okazinta en Seviljo en la jaro 1984. Tiam, ŝi havis la eblon denove elstari la esperantistecon de la patro de la Andaluza Patr-lando kaj same la ekziston de libroj en la internacia lingvo en la familia biblioteko. Sevilja Esperanto-Asocio sendis kondolecan mesaĝon al Fondaĵo Blas Infante. Ŝi pace ripozu.



María de los Ángeles Infante
1931 - 2024

ALIĜU AL Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Post solvi kelkajn problemojn kun la banko, nia asocio reaktivis la konton kiun ni aranĝis por ricevi jarajn aliĝojn.

La ekzisto de ĉiuj asocioj, ankaŭ de AEU, dependas ĉefe de la kunlaborado de la membroj, pro tio ni invitas al vi pagi la kotizon por la jaro 2024.

La jara kotizo estas 20 € kiun vi povas pagi ĉe:
Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698
Asociación Andaluza de Esperanto



HAZTE SOCIO DE LA Asociación Andaluza de Esperanto

Después de algunos problemas con el banco, nuestra asociación vuelve a activar la cuenta que mantenemos para el cobro de cuotas.

La vida de cualquier asociación, también la nuestra, depende principalmente de la colaboración de sus socios, por eso te invitamos a que abones la cuota correspondiente al año 2024.

La cuota anual es de 20 € que puedes ingresar en
Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698
Asociación Andaluza de Esperanto

La "sevilano" kiu evitis la almeton de Hispanio al la Unua Mond-milito.

Otto Engeldhardt naskiĝis en la germana urbo Brunswick en la jaro 1866. Jun-aĝe li sekvis inĝenieran karieron kaj ankoraŭ dudek-jaraĝa la elektra kompanio *AEG* sendis lin en Sevilon. Tio okazis en la jaro 1894, kiam *AEG* kaj la banko *Deutsche Bank* kunligis sin por mastrumi la elektran kompanion de la urbo Sevililo - *Sevillana de Electricidad* -. En Germanio, Engeldhardt jam montris sian kapablecon kiel lertan direktoron de kompanio de elektraĵ tramoj en la urbo Anhalt.

Li ekfunkciigis la elektran kompanion de Sevililo, kiu en la jaro 1896 jam disponis pri 500 abonantoj, krom la Tabak-fabriko, la haveno kaj festo tre grava kaj populara, la iluminado de la Sevila Foiro. Poste, la elektra kompanio ekigis sian disvastigon tra la sevila provinco kaj poste tra la tuta Andaluzio.

Post la elektra kompanio oni dungis S-ron Engeldhardt por ekfunkciigi alian entreprenan projekton: *The Seville Tramways* (jes, en la angla lingvo "Sevilaj Tramoj"). Ĉi tiu kompanio enirigis tramojn en la urbon Sevilon, entute preskaŭ 20 kilometrojn tra la urbo, tiam andaluzia ĉefurbo fariĝis la kvina en Hispanio disponi pri tiuj veturiloj, " *kiuj marŝas sen ĉevaloj* ", laŭ la tiuepokaj ĵurnaloj. Iom post iom, la germana Engeldhardt fariĝis andaluzo, la edzino kaj du filoj fine venis en Sevilon, kie ili estis konataj kaj respektataj



Otto Engeldhardt
1866 - 1936

de la tutaj sevilanoj. Eĉ laŭdire, li ĝuis andaluzian spritan karakteron, ekzemple, li decidis, ke la tramo kies itinero finiĝis en la sevila tombejo devus havi la numeron *13-an*.




Tramoj en Sevilo apud la katedralo jaro 1890

La germana ambasado en Madrido estis atenta al la influo de Otto Engeldhardt en Sevilo, do oni decidis nomumi lin honora konsulo de la Germana Imperio en la urbo. Dum tiuj jaroj Sevilo fariĝis pli grava por ontaj germanaj investoj, tiel estus konvene disponi pri influanta homo en la urbo. Tio okazis en la jaro 1903. Lia unua projekto estis konstrui germanan lernejon en Sevilo, en tiu momento lia propono ne sukcesis, sed feliĉe tio okazis post kelkaj jardekoj.

En la jaro 1914 eksplodis la unua mondmilito. La brita kaj franca konsuloj en Sevilo postulis al la elektra kompanio la eksigon de la germana direktoro, sub la minaco ĉesigi la sendadon de karbo por la kompanio. Reage, li mem demisiis de siaj postenoj kiel direktoro de la elektra kaj de la trama kompanioj. Tamen, dum la unua mondmilito la konsulo Engeldhard plenumis unu el la plej grandaj heroaj aktoj por la urbo kaj eĉ por la tuta Hispanio, kvankam tiutempe la afero tute ne estis diskonigita.

Kiam la milito komenciĝis en aŭgusto 1914, Hispanio oficiale prisciigis sian neŭtralecon. Malgraŭ tio, oni provizis la britajn industriojn per krudaj materialoj, eltiritaj el hispanaj minejoj, por fabriki armilojn. Tiu komerco fariĝis per ŝipoj ofte elirantaj el la sevila haveno. La germana ambasadejo en Madrido kontaktis kun S-ro Engeldhardt, kiel konsulo en Sevilo, por informi al li pri plano. Laŭ ĝi, germana submarŝipo havigus al la konsulo dinamiton kaj bombojn, kiuj devus esti deponitaj sur kelkaj hispanaj transport-ŝipoj ĉe la sevila haveno. Tiel, krom la detruo de transportiloj kiuj utilis al la brita armeo, preskaŭ certe Hispanio nuligus sian neŭtralan statuson kaj tio faciligus atakojn de Germanio al Hispanio kun la celo nuligi la helpon havigitan al la britaj armilaj fabrikoj.

La dinamito estis havigita al germanaj konsuloj de Kadizo kaj Seviljo. Otto Engeldhardt transportis la bombojn en sia propra aŭtomobilo, poste li lasis la mortigan materialon en sia domo. Tamen, la konsulo rifuzis la ideon plenumi atakon ĉe neŭtrala lando kaj ebligi la eniron de Hispanio en la unuan mondmiliton. Do, li informis al la germana ambasado en Madrido, ke li ne plenumus la ordonojn ricevitajn. La bomboj restis ĉe Otto Engeldhardt, li mem fine detruis ilin pere de enigo en la akvojn de la rivero Gvadalkiviro. Vere, konsulo Engeldhardt estis pacifisto.



Germana submarŝipo en la Golfo de Kadizo dum la Unua Mond-milito

Post la milito, Otto, iom post iom, forlasis siajn rilatojn kun Germanio. Li rifuzis sian germanan civitanecon kaj li fariĝis hispano. Li verkis tiujn viverojn en sia libro *"Adios, Alemania"* (Adiaŭ, Germanio). Li eĉ retrodonis medalojn kaj ordenojn ricevitajn de la germana registaro dum la jaroj kiujn li plenumis kiel konsulo en Seviljo. Tiel, li deziris nuligi kian ajn rilaton kun Germanio, kie tiutempe novaj naziaj aŭtoritatuloj suriris. Estas necese diri, ke li abomenis la nazian politikan reĝimon.

Jam eks-inĝeniero kaj eks-konsulo en Seviljo, Otto Engeldhardt entreprenis novan etapon en sia vivo. Li konstruis belan vilaon en San Juan de Aznalfarache, vilaĝo apud la urbo Seviljo, kaj tie li starigis farmacian kompanion kun la nomo "Sanavida", kiu ellaboris efikajn medikamentojn tre uzatajn en tiuj jaroj. Li komencis verki siajn memoraĵojn kaj kunlabori ofte kun sevilaĵ ĵurnaloj. Pri sia rigardo de la tiutempa politiko li skribis:

"Dank' al Dio, mi nun vivas kiel hispana civitano, sub la protektado de registaro, kiu distas de la faŝismo kiel mi mem, de Hitlero kaj siaj princoj. Mi

ne ĉesas ami Germanion kaj al ĝi mi tutkore deziras feliĉajn baldaŭajn tagojn sen Hitlero, sen baronoj, sen princoj, veraj respublikaj tagoj, ĉar tion meritas la pacema germana popolo".

Kompreneble, ĉi tiaj opinioj verkitaj sur sevilaj ĵurnaloj altiris la atenton de la novaj naziaj germanaj aŭtoritatuloj, kiuj pere de la nova konsulo en Sevilo, Gustav Draeger, komencis kontroli S-ron Engeldhardt. Tamen, tio ne malkuraĝigis al Otto, kiu daŭre sendis leterojn al la germana konsulejo kun siaj opinioj pri Hitlero. Li eĉ flirtigis germanan kontraŭ-nazian flagon en sia domo.



Otto Engeldhardt en la familia vilao de San Juan de Aznalfarache (Sevilo)

Kiam komenciĝis en Hispanio la civila milito en la jaro 1936, Otto Engeldhardt jam estis 70-jaraĝa. Ĝuste tiam li estis en hospitalo, tie kiu hodiaŭ stariĝas la Parlamento de Andaluzio. Tuj post eliri el la hospitalo li estis arestita, sendube li troviĝis sur nigra listo de homoj kiuj devus esti pereigitaj, ĉar liaj opinioj kontraŭ Hitlero, aliancano de la ribelitaj militistoj en Hispanio, estis ĉies konataj. Tiel, la 14-an de septembro 1936 li mortis pafita ĉe la murego de la sevila tombejo. Liaj familianoj ricevis admonojn de la ribelantoj ne sekvi la paŝojn de la patro kaj tiel eviti kian ajn kritikon al Hitlero aŭ al Franko. Kiel lasta bato la familio devis akcepti la okupon de la vilao en San Juan de Aznalfarache, fare de militistoj senditaj de la germana nazia registaro por helpi la ribelantojn.

Tamen, la urbo Sevilo ne forgesis lin, tiel en la jaro 2018 la sevila urbodomo decidis nomigi straton per la nomo "Otto Engeldhardt".



Strato "Otto Engeldhardt" en la urbo Sevilo



Algunos números atrás de la revista tratamos el tema de los verbos que no tienen sujeto, los más típicos y los que siempre se mencionan son *pluvi* y *neĝi*. En español ocurre lo mismo, el verbo "llover" no tiene sujeto, simplemente llueve, nadie ni nada llueve. En este número vamos a hablar de los verbos que no tienen complemento u objeto directo, los llamados verbos intransitivos.

En primer lugar hay que volver a recordar que la estructura típica de una frase en español, y en otros muchos idiomas, es Sujeto + Verbo + Objeto Directo. Pero esta estructura no se repite en la totalidad de los idiomas, de ahí que en esperanto para diferenciar el sujeto del objeto indicaremos este último añadiéndole la terminación del acusativo "-n". Veamos un ejemplo:

Aglo kaptis kuniklon *Un águila capturó un conejo.*

El simple hecho de colocar un sustantivo tras el verbo no necesariamente indica que ese sea el objeto, así esta frase tendría el mismo significado:

Kuniklon kaptis aglo *Un águila capturó un conejo.*

Así que recordemos la primera regla:

La colocación de una palabra en la frase no determina su función en esa oración, para eso tenemos el acusativo.

Así que partiendo de la idea de que no necesariamente lo que se coloca tras el verbo es el objeto directo, pasemos a ver algunos verbos que NO tienen objeto, aunque coloquemos detrás de él algún sustantivo.

DANCI (bailar).

El verbo *danci* tiene sujeto, alguien que baila, pero no tiene objeto directo. Veamos un ejemplo:

La gejunuloj dancis dum la tuta vespero.
Los jóvenes bailaron durante toda la tarde.

En esta frase el sujeto son "*la gejunuloj*", mientras que el verbo es "*dancis*". Podríamos decir también:

Dancis la gejunuloj dum la tuta vespero.

Pero el hecho de colocar un sustantivo tras el verbo no le otorga una función de objeto directo, porque simplemente el verbo *danci* no lleva objeto. Así que podemos decir que "los jóvenes bailan", que lo hicieron "durante toda la tarde", que lo hicieron "al estilo rock n' roll", pero este verbo *normalmente* no lleva objeto directo, porque no lo necesita.



La gejunuloj dancis rokenrole dum la tuta vespero

Sin embargo, hemos dicho que el verbo *danci* no lleva "normalmente" objeto directo, y eso ya indica que sí puede llevarlo en alguna ocasión, aunque suene un poco forzado. Imaginemos esta frase:

Gejunuloj dancis akrobatajn dancon dum la tuta vespero.

Puede decirse, y se comprende en la frase anterior, que los jóvenes bailaron unos bailes acrobáticos. Pero el hecho de repetir en la misma frase "*dancis-dancojn*" no resulta nada estético, ocurre lo mismo que en español, no resulta normal decir "bailaron bailes", resultaría mejor decir "realizaron, llevaron a cabo, ejecutaron.... bailes".

Pues lo mismo ocurre en esperanto. Entendemos perfectamente la frase "*la gejunuloj dancis akrobatajn dancojn*", sin embargo resulta mejor decir:

faris
La gejunuloj plenumis akrobatajn dancojn.
realigis

Así que incluso a los verbos que no llevan objeto directo se les puede añadir uno, utilizando simplemente el acusativo "-n".

Veamos otro verbo:

MORTI (morir)

Este verbo tan triste tampoco lleva objeto directo. Veamos un ejemplo:

La maljuna aktoro mortis hieraŭ.
El viejo actor murió ayer.

Se puede indicar que alguien falleció en un momento determinado (*hieraŭ*); que lo hizo en paz (*pace*); que ocurrió acompañado de sus familiares (*akompanita de siaj familianoj*), pero no se añade ningún objeto directo a este verbo.

Aunque de nuevo hay que reconocer que, al menos en teoría, si añadimos un sustantivo en acusativo ya le estaremos añadiendo un objeto directo, aunque resulte poco estético. Veamos un ejemplo para este verbo:

La herooj mortis gloran morton.
Los heroes murieron (más bien "tuvieron") una muerte gloriosa.

Incluso los verbos que no suelen llevar objeto directo, si le añadimos un sustantivo en acusativo "-n", ya le estamos atribuyendo un objeto directo, aunque no resulte muy estética la repetición de la misma palabra.

En el ejemplo anterior la traducción literal sería "murieron una muerte gloriosa", pero es mejor evitar esa repetición "*mortis/morton*", así que se podrían utilizar otros verbos:

trovis
La herooj havis gloran morton.

Veamos más verbos que no tienen objeto directo:

OKAZI (ocurrir, tener lugar, acaecer)

Cuando usamos este verbo hay que volver a recordar lo que se dijo al principio, aunque coloquemos después de un sustantivo un verbo eso no quiere decir que cumpla la función de objeto directo. Con el verbo *okazi* esto queda muy claro.

Okazis granda ŝtormo dum la koncerto sub la libera ĉielo.
Ocurrió una gran tormenta durante el concierto al aire libre.

Es cierto con el verbo *okazi* (ocurrir) el sujeto suele ir detrás del verbo, así:

okazis granda ŝtormo - okazis publika omaĝo - okazis altkvalita parolado.

Sin embargo, en todos estos ejemplos lo que va detrás del verbo no es un objeto directo, sino el propio sujeto de la oración, lo que ocurrió, porque el verbo *okazi* no lleva objeto directo.

Así, podemos decir "granda ŝtormo okazis" o también "okazis granda ŝtormo", pero de ninguna de las maneras diríamos "okazis grandan ŝtormon", porque recuerda que el verbo *okazi* no lleva objeto directo. Además, si decimos que algo le ocurrió a alguien, ejemplo:

Okazis terura aventuro al li
Le ocurrió a él una terrible aventura.

utilizamos para designar al receptor de lo que ocurrió la preposición "*al*", es decir, no diremos "*terura aventuro okazis lin*", sino "*terura aventuro okazis al li*". De ahí que cuando se pregunta "¿Qué ocurre?", decimos "*Kio okazas?*" y no "*Kion okazas?*", porque el verbo *okazi* no lleva objeto directo.

Kio okazas al vi? - ¿Qué te ocurre?

Veamos ahora otro verbo sin objeto directo:

ĜOJI (sentir un gozo, gozar, pasarlo bien)

La festo estis mirinda, ni ĉiuj ĝojis multe.

La fiesta fue maravillosa, todos nosotros lo pasamos bien.

Y si queremos indicar que lo que gozamos fue de una fiesta, usaremos la preposición "pri":

Ni ĉiuj ĝojis pri mirinda festo.

Todos nosotros gozamos de una fiesta maravillosa.

Pero nunca "ni ĝojis mirindan feston", porque el verbo *ĝoji* no lleva objeto directo.

Terminamos este número con otro verbo intransitivo:

MILITI (guerrear, hacer la guerra)

La armeoj militis sur la tero kaj la maro.

Los ejércitos guerrearon en la tierra y en el mar.

Se pueden repetir todos los ejemplos que se han dado para los verbos anteriores, se puede "guerrear cruelmente" (*militi kruele*); "hacer la guerra sin cuartel" (*militi senindulge*) y aunque pudiera decirse "*militi kruelan militon*", el uso de "*militi/milton*" no resulta adecuado, porque estamos repitiendo una palabra en una misma frase.

Aunque también resulta necesario decir, que si repetir dos palabras en una frase no resulta muy adecuado en una frase normal, no ocurre lo mismo si hablamos de lenguaje poético, es lo que llamaríamos "aliteración", o repetición constante de sonidos en una frase, lo que se suele utilizar en lenguaje poético.

Así, aunque en una frase en un contexto normal no resultaría lógico decir "*la armeoj militis kruelan militon*", en un lenguaje poético sería un recurso literario a utilizar repetir las palabras o los sonidos, por ejemplo:

Milfoje mi militis miljarajn militojn.

Miles de veces guerreé guerras milenarias.

Pero está claro que en este ejemplo nos encontraríamos ante un lenguaje poético.




Fernando Villalón
Sevilo 1881 - Madrido 1930

Seviljana kaprico

La strateto estas vundo
kalke-lume kuracita...
ludas kun rozuj' la suno
en fenestro florvestita.
Invitas al preĝ' siesto,
l' akv' preĝante eterniĝas,
en silenta kort' surprize
kriis rozo eskvizita,
kaj sur kristalpura fonto
rave bela roz' sin klinas...

Fernando Villalón

Tradukis: Antonio Marco Botella





NUNTEMPA VORTARO

ANDALUZIAJ FOIROJ



Foira budo

Simpla dometo ĉe la foirejo, kie renkontiĝas membroj de asocio, grupo, amikaro ktp, aŭ ĝenerala publiko, por agrable kaj gajige distri.



Foirejo

Terenoj kie okazas foiro. Tie oni starigas, simile al efemera urbo, portalon, budojn, atrakciojn ktp.



Portalo

Impona konstruaĵo starigita sur la enirejo de la foirejo. Ĝi povas esti efemera, tio estas videbla nur dum la foiraj tagoj, aŭ daŭra, se la konstruaĵo estas tie dum la tuta jaro. Ofte, oni konstruas ĝin simile al monumento de la urbo.



Iluminado

Ornamado de la foirejo per lumiloj ordinare simetrie dismetitaj. La ekigo de la iluminado startigas la foirajn tagojn.

Lampionoj →

Lampetoj en diverskolora papera ujo, uzata en iluminado.





Atrakcioj Instalaĵoj uzablaj nur dum la foiraj tagoj kies celo estas tenti diversajn sentojn de siaj vizitantoj.



Karambolaj Aŭtetoj

Mekanika elektra atrakcio, kie partoprenantoj stiras aŭtetojn kiuj povas kolizii inter si, ĉar la bazo de la aŭtoj estas protektata per kaŭĉuka gumo.



Giganta Rado

Foira atrakcio, kiu konsistas el granda vertikala radego kun pasaĝeraj gondoloj, kiuj estas fiksitaj ĉe la rando.



Tombolo

Foira atrakcio, kiu konsistas el budo kie oni organizas loterion, en kiu ĉiu gajninto ricevas galanterian aŭ bagatelan artiklon.



Art-fajraĵoj

Eksplodaĵo, arte komponita, destinita krei belajn vidaĵojn en mallumo. Ĉi tiu spektaklo okazas ĝuste en la komenco kaj en la fino de la foiro.



Flamenka Robo **Falbala Robo**

Tipa andaluzia virina kostumo, kun larĝa rubando alkudrita je la malsupro de jupo kaj ofte ankaŭ je manikoj, por ĝin ornami.



Seviljana Danco

Tradicia konata danco kaj kanto de Andaluzio, kiu naskiĝis en la urbo Seviljo. Temas pri tipa dancado dum la celebrado de multaj andaluziaj foiroj.

Kaleŝo

Kvarrada, luksa veturilo, uzata por promenadi, je kelkaj fiksitaj horoj, ĉe la foirejo.



Ornamenta Kombilo

Ornamenta uzata apud flamenka robo, konveks-forma kaj kun dentoj, fiksitaj apud virina har-tubero.

Ŝaleto

Malgranda silka tuko, portita sur la ŝultroj, kiu malsupreniras ne pli ol ĝin la talio.



Manzanilo

Unuaranga pala vino, ellaborita en la kadiza urbo Sanlúcar de Barrameda, kiu estas ofte gustumita dum la andaluziaj foiroj.





Folioj por praktikado

EŬRO AĜAS DUDEK KVIN JAROJN

Eŭro, la ĉefa mon-unuo de Eŭropa Unio, naskiĝis **la 1-an de januaro 1999**. Tiam dek unu landoj forlasis la proprajn **monunuojn** por enkonduki la eŭron. Hodiaŭ ĝi estas la monunuo de preskaŭ **350 milionoj da eŭropanoj loĝantaj** en 20 landoj. Post la usona dolaro la eŭro estas **la dua plej grava monunuo** en la internacia mon-sistemo.

Kvankam la eŭro estas nun konsiderata sukceso, **kiam oni unue proponis** krei ĝin, multaj kontraŭis. Inter tiuj estis famaj ekonomiistoj kaj respektataj politikistoj. Ekzistis bonaj ekonomiaj kaj politikaj kialoj por enkonduki komunan monon, sed estas certe, ke ekzistis ankaŭ grandaj danĝeroj ligitaj al **tia salto en la nekonaton**. Do kial fari tion?

La ideo pri eŭropa unuiĝo evoluis post la Dua Mondmilito, kun la celo kunigi ŝtatojn, kiuj intermilitis **de jarcentoj**. Tiu unuiĝo celis malhelpi novan militon. La komunumo de eŭropaj ŝtatoj **iom post iom** kreskis kaj aldonis novajn membrojn. De 1993 ĝi nomiĝas Eŭropa Unio (EU).

> la 1-an de januaro 1999

Recordemos que las fechas en esperanto se indican con el número ordinal del mes en acusativo. Ejemplo: *Mi naskiĝis la 7-an (sepan) de aprilo 1998*. En cuanto a cómo designar mes y año, lo más usual es indicar "de + mes" (de aprilo) y a continuación el número del año, sin necesidad de volver a usar de nuevo la preposición "de" (*de aprilo de 1998*). Aunque no es incorrecto volver a usar esta preposición, pero por una simple cuestión de economía en el lenguaje basta con indicar solo el año.

> monunuo / mon-unuo

En el texto que se propone aparece la misma palabra escrita de dos maneras distintas: mon-unuo / monunuo. La traducción de este término en ambas ocasiones es la misma "unidad monetaria". Como ves se trata de una palabra compuesta, es más, en español utilizamos dos palabras, pero en esperanto se pueden unir en una sola. ¿Entonces, cómo unir "mono" (dinero) + "unuo" (unidad)? Lo podemos hacer de dos maneras:

- Colocamos siempre la palabra importante al final. En este caso hablamos de unidades monetarias, así que hablamos de "unidades", por lo que *unuo* irá al final. A la primera palabra le quitamos su terminación de sustantivo *mon-o* y directamente se añade a la palabra principal, que recuerda "siempre se coloca la última". Así: *monunuo*.

- Seguimos exactamente la misma vía que hemos descrito anteriormente, pero para dejar totalmente claro que se trata de dos palabras, colocamos un guión entre ambas: *mon-unuo*. Pero recuerda, la palabra importante se coloca siempre al final.

Veamos otro ejemplo: la palabra *tertremo* / *ter-tremo* (terremoto).

Hay que indicar en primer lugar, que el concepto importante en esta unión de palabras es que expresa la idea de un movimiento, de un temblor (*tremo*) no de una tierra (*tero*), por lo que la palabra importante irá al final. Así la primera puede unirse directamente a la principal perdiendo la terminación de sustantivo: *tertremo*, o unirse colocando un guión entre medias de ambas palabras: *ter-tremo*.

> 350 milionoj da

Ya hemos hablado muchas veces de este uso del partitivo "da". Cuando nos referimos a una cantidad de algo, no usaremos la preposición "de", sino "da". Veamos algunos ejemplos:

En Andaluzio loĝas ok milionoj da homoj.

En Andalucía viven ocho millones de personas.

Ŝi loĝis en Kadizo dum dudeko da jaroj.

Ella vivió en Cádiz durante una veintena de años.

Kiom da gefiloj vi havas?

¿Cuántos hijos tienes?

> loĝantaj

En español utilizamos el relativo "que" en este tipo de frases:

Las personas que viven en Málaga son malagueños

En esperanto podemos usar también el relativo (kiu-kiuj) o el participio de presente del verbo (-anta / -antaj). Así, podríamos decir:

Homoj, kiuj loĝas en Malago estas malaganoj.

Homoj loĝantaj en Malago estas malaganoj.

Veamos algunos ejemplos más de este doble posible uso:

Junuloj, kiuj parolas esperanton povas facile vojaĝi tra la mondo.

Junuloj parolantaj esperanton povas facile vojaĝi tra la mondo.

Los jóvenes que hablan esperanto puede viajar fácilmente por el mundo.

> La dua plej grava

Podemos traducirlo como "la segunda más importante". Recordemos el superlativo en esperanto:

Superlativo de superioridad: *la plej* + adjetivo.

Superlativo de inferioridad: *la malplej* + adjetivo.

> kiam oni unue proponis

Lo traducimos como "cuando se propuso primeramente". Recordemos que "oni" es un pronombre personal más, como *mi-vi-li-ŝi-ĝi-ni-vi-ili*. La única diferencia es que no se refiere a una persona en concreto (yo-tú-é...), sino que indica un sujeto indefinido, impersonal.

Oni diras, ke la hispana lingvo estas la dua plej grava en la mondo.

Se dice que la lengua española es la segunda más importante en el mundo.

> tia

Si queremos señalar a un objeto o a una persona que está allí, más o menos lejos, diremos: *tiu arbo* / *tiu homo* / *tiu aŭtomobilo*. Si queremos acercarlo y decir que están aquí, diremos: *ĉi tiu arbo* / *ĉi tiu homo* / *ĉi tiu aŭtomobilo*. ¿Entonces qué indica *tia*?

Imaginemos que no queremos destacar a ese árbol, a ese hombre o a ese coche porque están allí o aquí, sino que lo que queremos indicar es que se trata de un árbol, de una persona o de un automóvil con unas características que

queremos destacar o a las que nos queremos referir. En ese caso ya no diremos *tiu arbo*, sino *tia arbo* (un árbol de esa clase); tampoco *tiu homo*, sino *tia homo* (un hombre de esa clase); y por último no diríamos *tiu aŭtomobilo*, sino *tia aŭtomobilo* (un automóvil de esa clase).

Es cierto que no lo utilizamos muy a menudo, porque cuando hablamos de algo o de alguien nos referimos casi siempre a su localización en el espacio -cerca o lejos-, pero si lo que queremos es indicar el tipo, categoría, cualidad o característica de algo diremos *tia / ĉi tia* (de ese tipo / de este tipo). Veamos algunos ejemplos más:

- *Ne rilatu kun tiuj homoj!*

¡No te relaciones con esas personas!

(Se trata de evitar a una serie de personas en concreto)

- *Ne rilatu kun tiaj homoj!*

¡No te relaciones con ese tipo de personas!

(Se trata de evitar a una categoría de gente, no a nadie en concreto)

> en la nekonaton

Recuerda que, además del acusativo de objeto directo, existe el acusativo de dirección, que se usa para indicar que nos dirigimos a algún lugar con un movimiento. En la *nekonaton* se traduce por "hacia lo desconocido", usar el acusativo en el destino de nuestra marcha "*nekonato*" (desconocido), indica que vamos ya hacia ese sitio, que nos movemos hacia él.

> de jarcentoj

La traducción sería "desde siglos". *De* no solo indica la propiedad de algo: *la libro de mia amiko*, sino que también se usa para señalar el origen, se traduciría entonces como "desde". Y si queremos decir "desde hace", entonces usaríamos "de antaŭ".

- *De antaŭ multaj jaroj homoj militas kruele kaj sen-utile.*

Desde hace muchos años los hombres guerrearán cruel e inútilmente.

> iom post iom.

Se trata de una construcción que se puede traducir como "poco a poco".

- *Mi enamiĝis je ĉi tiu bela urbo iom post iom.*

Me enamoré de esta bella ciudad poco a poco.



Kiam sur ĉi tiuj paĝoj ni prezentas andaluzian vilaĝon, ni kutime diras, ke sur tiu aŭ alia loko, antaŭ multaj jarcentoj, ekloĝis iberoj aŭ tarŝiŝoj, poste romianoj, araboj ktp. Tamen, se ni parolas pri la vilaĝo San Roque, en Kadizo, ni povas sciigi, ke la urbo estis fondita la 31-an de majo 1706. Jes, ĝuste tiam! Kelkajn jarojn antaŭe, en 1704, dum la Milito de Hispana Sukcedo (1701-1714) brit-nederlanda milit-ŝiparo kun 61 ŝipoj kaj pli ol 30.000 soldatoj albordiĝis la golfeto

de Alheciro. Tiu loko estis defendita nur de 100 hispanaj soldatoj kaj 400 armitaj civiluloj. La atakantoj sieĝis la urbon Gibraltaron, situita ĉe la impona samnoma rokego. Kompreneble, defendantoj ne rezistis multe da tempo, tiel post kvar tagoj la urbo kapitalucis.

La invadantoj forpelis la enloĝantojn, tiam ili ekloĝis en apudaj lokoj, ekz. en Alheciro. La plejmulto el la gibraltaranoj kaj ties aŭtoritatuloj iris en apudan lokon kie ekzistis preĝejo starigita honore al Sankta *Roque*. Tiel, la 31-an de majo 1706 la antaŭaj enloĝantoj de Gibraltaro fondis tie urbon kun la nomo de la preĝejo: *San Roque*. La moto de la nova vilaĝo tion sciigas: "*Tre nobela kaj lojala urbo San Roque, tie kie rezidas la urbo Gibraltaro*". Kiel kuriozaĵo oni devas diri, ke la eksaj aŭtoritatuloj de Gibraltaro forportis la arĥivojn de la urbo kun ili, kiuj nuntempe troviĝas en la urbo San Roque.



Blazono de San Roque

La urbo poste fariĝis tipa landlima loko, kie de tempo al tempo kreskis kontrabandan komercon kun la brita kolonio de Gibraltaro. Nuntempe San Roque estas urbo kies ĉefa ekonomia

resurso estas kemia industrio produktanta energion kaj nafton. Alia resurso estas la alt-nivela turismo de la Suna Marbordo, tie troviĝas luksaj urbetoj kiel Sotogrande kaj la golfejo de Valderrama. Nuntempe loĝas en San Roque pli ol 30.000 homoj.

Monumentoj

Pro la fakto, ke San Roque ne estas tre olda urbo, verdire ĉe ĝi ne troviĝas tre antikvaj monumentoj.

- **Preĝejo Sankta Maria Kronita.**

Kiel dirite, la unuaj enloĝantoj de San Roque fondis la urbon ĉirkaŭ preĝejo dediĉita al ĉi tiu sanktulo. Sur tiu preĝejo oni konstruis alian en la jaro 1735 laŭ itala stilo.



- **Nova preĝejo.**

Oni konstruis novan preĝejon en la jaro 1801 laŭ nov-klasika stilo. Tie troviĝas la religia figuro, kiu nomigas la urbon.

- **Fontano de María España**

Konstruita dum la 18-a jarcento. Antaŭ multaj jaroj la fontano estis uzita de akvo-portistoj, kiuj tie plenigis kruĉojn kaj disvendis la akvon tra la tuta zono.

La Rokego ĉie videbla el la gibraltara urbo San Roque.



Festoj

En la urbo San Roque, kiel en la cetera kadiza provinco, la plej granda festo okazas dum la karnavalaj tagoj. Do, fine de la monato februaro kaj la komenco de marto estas eble sekvi la senbridan ludadon de grupoj, kiuj kantas kaj rakontas gaje pri ĉiuj temoj.



Gastronomio

Gastronomio en San Roque baziĝas sur maraj kaj kamparaj produktoj. El la maro ni trovas pladojn bazitajn sur tinuso, pagelo, engraŭloj, leandroj, kalmaroj, spad-fiŝoj kaj polpoj. Kaj tio, ne forgesante pork- kaj bovviandaĵo akompanitaj de legomoj ankaŭ produktitaj tie.

Malgraŭ la fakto, ke Hispanio restis neŭtrala dum la Dua Mond-milito, oni konstruis defendajn bunkrojn proksime al la brita kolonio Gibraltaro. Kelkaj el ili, jam ne-uzitaj, estas ankoraŭ videblaj en San Roque, eĉ ekzistas turisma itinero por viziti ilin.

Venontnumere Turismi en ...
PUEBLA DE DON FADRIQUE
(Granado)





Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio.

José de la Torre y del Cerro la kordova arĥivisto

La diskonigo de la lingvo esperanto en la urbo Kordovo dum la 1920-aj jaroj estis grandega. Sendube, ĉefrolulo de tiu disvastigo estis la kordova politikisto kaj arkitekto Francisco Azorín Izquierdo, kiu konstante menciis kaj sciigis pri esperanto al ĉiuj amikoj, kunuloj kaj ĝenerale al tiuj, kiuj iam interrilatis kun li. Dank'al tiu efika disvastigo, la internacia lingvo disponis en Kordovo pri du gravaj kulturaj hejmoj: la societo "Círculo de la Amistad" (Rondo de la Amikeco) kaj la Reĝa Akademio pri Scienco kaj Belartoj.

Ĉiuj tiutempaj kordovaj intelektuloj apartenis al unu aŭ al alia institucio, ofte eĉ al ambaŭ. Rilate la Akademion, Francisco Azorín eniris kiel membro en la jaro 1924 kaj depost tiam, lia ĉefa agado estis disvastigi la internacian lingvon. Baldaŭ, li altiris la atenton de kelkaj akademianoj, kiuj ankaŭ lernis esperanton. Kompreneble, oni ne povas aserti, ke tiuj homoj allogitaj de Azorín atingis grandan nivelon de la lingvo aŭ intense laboris por la movado, aŭ simple, ili simpatiis kun la ideo. Tamen, oni devas laŭdi la



José de la Torre y del Cerro
1876 - 1959

grandan laboron de la kordova arkitekto, kiu diskonigis esperanton ĉie kaj ĉiam, ni ne forgesu, ke tuj post la alveno en Meksikon kiel ekzilito post la hispana civila milito, li kunlaboris en la refondiĝo de Meksika Esperanto-Asocio.

Unu el tiuj kordovaj kleruloj, membro de la Reĝa Akademio de Kordovo, altirita al esperanto dum tiuj jaroj estis José de la Torre y del Cerro. Li naskiĝis en la jaro 1876, li sekvis studojn pri arĥivoj kaj pri arkeologio

en Madrido. En la jaro 1909 li estis arĥivestro de la Publika Biblioteko en Kordovo kaj ankaŭ en la Mezgrada Lernejo de la urbo. José de la Torre fariĝis membro de la Akademio de Kordovo en la jaro 1922, tiam li prezentis eseon pri la kordova deveno de la praaro de Miguel de Cervantes, la aŭtoro de Don Kihoto.



Publika Gimnazio en Kordovo. Nuntempe Gimnazio "Góngora"

Francisco Azorín aliĝis al la Akademio en la jaro 1924, ĉe tiu kultura institucio li ekigis senlakan propagando favore al esperanto. Ni eĉ devas diri, ke la Kordova Akademio sendis reprezentanton al internacia konferenco pri uzo de esperanto en la sciencoj, okazinta en Parizo en la jaro 1925.

Tutcerte, José de la Torre y del Cerro ne aŭdis unuafoje argumentojn favore al esperanto en la Kordova Akademio, tiel, kiel dirite, en la jaro 1909, li fariĝis arĥivestro en la kordova publika mez-lernejo, tiutempe ekzistis en la urbo nur unu el tiuj lernejoj. Nu, en tiu sama jaro, la direktoro de la

mezgrada lernejo, la franca Luciano Gisbert y Höel, akceptis la proponon de alia franca, Paul Linares, organizi en tiu lernejo la unuan kurson de esperanto kiu okazis en Kordovo.

Tamen, la influo de Azorín en la esperantigo de José de la Torre, kaj de aliaj elstaraj kordovaj intelektuloj

estas okulfrapa. José de la Torre y del Cerro ne nur simpatiis al la ideo pri internacia lingvo, sed li ankaŭ lernis ĝin. Do, li partoprenis en la hispana kongreso de esperanto de la jaro 1925 en Kordovo, tiam li eĉ okupis altrangan lokon en la prezida tablo. Vere lia esperantismo daŭris, tiel lia nomo kaj adreso aperas kun la numero 664 en la adresaro eldonita de Bohema Esperanto-Servo en la jaro 1930. Alie, kaj laŭ konitaĵoj havigitaj de Alicia Córdoba Deorador, direktoro de la Historia Provinca Arĥivo de Kordovo, en la biblioteko de José de la Torre y del Cerro troviĝis libroj, krom en la hispana lingvo, ankaŭ en la franca, angla, itala, kataluna kaj esperanto.

Post la hispana civila milito kaj ĝis la jaro 1946, li profesie agadis kiel direktoro de la Mezgrada Lernejo de Kordovo. Dum tiuj jaroj li ekigis esplorojn pri la kordovanino Beatriz Henriquez, edzino de Kristoforo Kolombo; ankaŭ pri Gonzalo Ximénez de Quesada, kordovano kaj fondinto de la urbo Bogoto en Kolombio kaj la hispan-perua verkisto Inca Garcilaso.

Pro ĉi tiuj esploroj li ricevis oficialajn rekononjn en Ĉilio kaj en Peruo.

En la jaro 1959 li forpasis. Lia domo, iama mezepoka palaco, ĉe la strato Sánchez de Feria, kiu estas menciata apud lia nomo ĉe esperantista adresaro, estas nuntempe la sidejo de la Kordova Arĥivejo.



Prezida tablo dum la malfermo de la 5-a Hispana Kongreso de Esperanto. Kordovo 1925.

- | | |
|--|----------------------------|
| (1) S-ro José de la Torre y del Cerro. | (2) Paul Linares Rapet |
| (3) Julio Mangada Rosenörn | (4) Francisco Serrano Olmo |
| (5) Francisco Azorín Izquierdo | |





$E = mc^2$ *Scienca Angulo*

Atakoj de orkoj en la Gibraltara Markolo

De antaŭ kelkaj jaroj, navigado en la Gibraltara Markolo trovas gravan problemon: la stranga konduto de grupo de orkoj, kiuj ĝenas malgrandajn velboatojn tie navigantaj. Esploristoj serioze pristudis la aferon, ili eltrovis, ke la problemojn okazigas naŭ orkoj, kiuj nur en la jaro 2023 atakis pli ol 20 ŝipojn.

suferis nur velboatoj kun simplaj seloj. Unuaj esploroj sciigis pri eblaj kialoj de tiuj atakoj. Tiel, ĉi tiu konduto povus ŝuldiĝi nur al defendaj agadoj, verŝajne iufoje tiuj orkoj estis vunditaj de rudroj aŭ de helicoj de tiaj ŝipoj, reage ili, kunordigitaj, rimarkas ke tiuj velboatoj povus esti "malamikaj bestoj", do atakendaj.



Atako de orko al ŝipo en la Gibraltara Markolo... aŭ ĉu temas nur pri ludo?

Ĉi tiuj agadoj komenciĝis en la jaro 2020, tiam kelkaj orkoj ĉe maroj apud la sudo de Portugalio kaj Hispanio, alproksimiĝis al velboatoj. Ili unuamomente simple tuŝetis selojn de la ŝipoj, tamen, ili poste batis forte la akvoveturilojn. Kutime, atakojn

Laŭ alia teorio, orkoj eble komprenas, ke ŝipoj fiŝkaptas, do, ili asocias velboatojn kun rivaloj, kiuj kaptas nutraĵojn. Ni sciu, ke orkoj estas ege inteligentaj bestoj, kapablaj organizi sin en firmaj grupoj. Do, ili povas lerni kaj instrui novajn

manovrojn por ataki rivalojn en la maro.

Lastatempe, nova teorio aperis. Tiel, laŭ kelkaj maraj esploristoj, la plejmulto el la orkoj atakantaj velboatojn estas junaj. Ili alproksimiĝas al la boato kaj komencas bati la rudrojn per siaj nazoj kaj kapoj. Ĉi tiuj junaj orkoj mezuras inter 3 kaj 5 metrojn, do, facile ĉi tiuj atakoj, aŭ reale ludoj, damaĝas la ŝipetojn.

Same, oni asertas, ke fiŝkapt-limigo de ruĝaj tinusoj pliigis la stokon de tiuj fiŝoj en la okcidenta Mediteraneo, do, ili estas pli facile kapteblaj de la orkoj kaj pro tio, ili ne necese okupas sian tutan tempon por atingi nutraĵojn.

Tiel, ili dediĉas sin ludi kun tiu, kiu troviĝas en la maro, do, velboatoj. Laŭ sciencistoj, ne temas pri atakoj al velboatoj, sed male, pri ludoj kun tiuj objektoj troviĝantaj sur la maro. Komprenoble, ili ne konscias, ke damaĝi rudron povas okazigi problemojn al boatoj. Eĉ oni parolas pri tradicioj kaj kutimoj de la orkoj, kiuj de tempo al tempo trovas novajn manierojn okupi sian tempon kiam ili ne fiŝkaptas.



HUMURO





Flamenko

Corruco de Algeciras

José Ruiz Arroyo, konata en la flamenka mondo kiel Corruco de Algeciras, naskiĝis en La Línea de la Concepción (Kadizo), en la populara kvartalo La Atunara, en la jaro 1910. Apenaŭ unujaraĝa la familio translokiĝis en la proksiman urbon Alheciron, tiel unu el la fandangoj de Corruco kantas:

*En L'Atunara mi naskiĝis,
en La Línea verŝita bapto-akvo,
en Alheciron oni min portis
fermitaj l'okuloj en mia vizaĝo.*

Jun-aĝe, li komencis kanti en la Kafejo de la Maŭro. Iam, ĉe tiu spektaklejo ĉeestis Manuel Vallejo, tre konata tiutempa flamenka kantisto. Tiam, li invitis al Corruco kanti en aliaj lokoj de la urbo, samtempe li interrilatis kun aliaj konataj kantistoj kaj gitaristoj, kiel *Choclero*, *Tío Mollino*, *Niño de las Botellas* kaj *Manitas de Plata*, kiu fariĝis sia kutima akompananto gitar-lude.

En la jaro 1928 li partoprenis en flamenka konkurso organizata en Alheciro kaj nur unu jaron poste, li debutis en Sevilo. De tie, li trakuris la tutan hispanan geografion: Granada,



Bando da verdialaj kantistoj en Malago

Madrido, Barcelono, tie li surbendigis kelkajn gramofon-diskojn.

Kvankam li sekvis ortodoksan vojon en la flamenka kantado, verdire oni povas diri, ke li estis la unua kantisto kiu aperigis sociajn kaj politikajn temojn en siaj tekstoj. Eble pro tio, kiam la hispana enlanda milito eksplodis en la jaro 1936 li ne dubis aliĝi al la respublika armeo. Li mortis, apenaŭ 28-jaraĝa en la jaro 1938 dum la batalo de la rivero Ebro.

Ofte, li kantis fandangojn, tamen li ludis buleriojn, segiriojn, solearojn kaj tarantojn. Laŭ fakuloj de la flamenka arto, la fandangoj de Corruco de Algeciras havas personajn

karakterojn, temas pri profunda kaj tragika fandango, kantita per plorema voĉo.

Kiel dirite, verŝajne Carruco estis la unua flamenka kantisto kiu eniris en siajn kantaĵojn politikajn tekstojn, tio kompreneblas se oni scias, ke kiam li ekkantis floris la soveta revolucio kaj poste en Hispanio oni proklamis la respublikan reĝimon:

*La herbo sur la vojo
premita de voj-iranto.
La herbo sur la vojo
premita de proletaro,
ankaŭ de riĉuloj fiaj,
tiuj, kiuj mon-avidas.*

Li ankaŭ kantis la proklamon de la Hispana Respubliko en la jaro 1931:

*Krio de libereco
lanĉita de Hernández kaj Galán.¹
Tiam tremis trono kaj krono,
post tiu voĉo triumfis
la Respubliko Hispana.*

*Triumfis nia flago
sur ĝi aperis viola strio,
ĝi konkeris la tutan landon.
Dank'al Hernández kaj Galán
rompis siajn ĉenojn Hispanio.*

¹ La kapitanoj Fermin Galán kaj Ángel García Hernández ribelis kontraŭ la hispana monarkio en la jaro 1930, ili estis mort-pafigitaj. La Hispanan Respublikon oni proklamis nur kelkaj monatoj poste

Antikva gramofona registraĵo de Corruco de Algeciras ĉe:

https://www.youtube.com/watch?v=envDorARFQ4&list=OLAK5uy_kYboW1Lw5y4VkcFsBQ2cT2LsHI7n6lQRM



Esperanto, ponto inter popoloj



Ponto Espinosa super la rivero Darro (Granado) - 17-a jarcento



Fervojista Angulo

La fervoja linio en la Parko

"El Alamillo" en Sevilo.

De antaŭ 25 jaroj ekzistas en la urbo Sevilo la plej malgranda stacidomo kaj vagonaro en Hispanio. Temas pri la fervoja linio de la Parko "El Alamillo". En la jaro 1999 grupo de eksaj laboristoj de la hispana fervoja kompanio RENFE kaj asocio de amikoj de la fervojoj, decidis konstrui en tiu parko malgrandan fervojan linion, kie funkcias malgrandaj lokomotivoj kaj vagonaroj, kelkaj el ili funkciantaj pere de akvo-vaporo nutritaj de karbo.

La vojaĝantoj estas ĝenerale infanoj, kvankam ĉiuj homoj estas akceptataj. Ili sidiĝas sur la vagonoj kaj la ŝoforo de la lokomotivo estas aŭtentika fervojisto. Vojaĝo daŭras proksimume kvin minutojn, ĝi okazas ene de natura etoso, la urba parko *El Alamillo* en Sevilo.

La ideo funkciigi ĉi tiun fervojan linion aperis ene de grupo de eksaj laboristoj de la hispana fervoja



Publiko kaj vojaĝantoj
ĉe la stacidomo de El Alamillo (Sevilo)

La linio mezuras 500 metrojn, kune kun pliaj 200 kiel helpa linio. Ĝi trapasas tunelon, ponton kaj ĝi estas reguligita de semaforoj.

kompanio RENFE kaj de la Sevila Asocio de Amikoj de la Fervojoj, kiu respondeciĝas pri la ekspluato de la linio. Vojaĝo kostas 1 eŭron, la tuta

mono atingita utilas por subteni la fervojan linion, stacidomon kaj la karbon uzitan por funkciigi la lokomotivon.

Ĉiuj maŝinoj kaj instalaĵoj necesaj por la funkciado de la fervojo estis konstruitaj de eksaj fervojistoj, kiuj vere entuziasmiĝas pro la fervoja

mondo, eĉ kiam ili jam estas emeritaj. Tiel, trafiko estas reguligita eĉ de aŭtentika staciestro.

Do, okaze de dimanĉa vizito al Seviljo ne hezitu iri en la parkon *El Alamillo* kaj vojaĝi sur ĉi tiu vagonaro, la okazo estas mirinda kaj plenĝoja.



<https://hafe-19.websself.net>

TTT-paĝo de Hispana Amikaro de Fervojistoj Esperantistaj

Hispana Amikaro de Fervojistoj Esperantistaj

Kio estas H.A.F.E.? Artikoloj kaj Videoj Fervojista Vortaro



Kio estas H.A.F.E.?

Hispana Asocio de Fervojistoj Esperantistaj
Grupo de Amigos de los Ferrovianos Esperantistas
Servicio Español de la Federación Internacional Ferroviana Esperantista

¡Iniciarse!

Malpliigu la konfid-ekspluaton!



D-ro Hugo Masterson subite turniĝis kiam iu malfermis la pordon de la laboratorio. Tie starigis virino kun pala vizaĝo. Ŝi aspektis timeme.

Hugo! Kiom da fojoj mi diris al vi, ke Mi... vi ne devas eniri en mian laboratorion kiam mi laboras ???

Lia edzino ektremis kiam ŝi aŭdis liajn vortojn, kiuj estis kiel teruraj vipo-batoj. Ŝi balbutis.

Prof, Prof, Profesoro Hardin ĵus alvenis, li dez, deziras renkonti vin.

Nu, ne restu tie, akompanu lin en la laboratorion, kaj faru tion rapide!



Hugo lanĉis aron da insultoj kiam lia edzino eliris el la laboratorio. Tamen, sur lia vizaĝo aperis granda rideto kiam Profesoro Hardin eniris tien.

Kara Profesoro Hardin. Estu bonvena en mian humilan laborejon!

Bonan vesperon, Doktoro! Mi esperas, ke mia vizito ne ĝenu vin.

Hugo lanĉis ironian rideton.

Ne multe, profesoro. Por mi estas honoro. Ĉu mi povas havigi al vi ion?

Ho, jes! Malvarman teon. Dankon!

Marta! Marta! Tason da teo!

Kara Doktoro, ĉu viaj eksperimentoj progresas?

Ĉio iras antaŭen. Mi nur bezonas pruvi, ke mia formulo funkcias taŭge.

Jes Hugo. Kion vi deziras?

Ho, Marta! Kiom da fojoj mi devas averti, ke vi ne povas interrompi min? Ek! Havigu al ni du tasojn da malvarma teo.

Jes, Hugo.

Prof. Hardin tuŝis sian kolon, tuj post aŭdi la malagrablajn vortojn de Prof. Masterson.

Vi, vi parolis ion pri baldaŭa sukceso de via formulo, ĉu ne?

Stulta virino! Jes, jes, mi estas tute certa, ke mia formulo estas sukcesa. Mi nur bezonas provi ĝin ĉe kancera histo.

Prof. Hardin vidis la prov-tubon kun verda likvido, kiun Prof. Masterson havis enmane.

Do, vi asertas, ke via formulo kapablos kuraci definitive kiun ajn kanceron, ĉu ne?

Tutcerte, kara profesoro! Kompreneble vi estas invitata okaze de ties unua provo.

Okuloj de Prof. Hardin ekbrilis. Deziroj pri plia kono aperis en lia vizaĝo.

Por mi estus granda honoro!

Nu, mi havas kobajon en mia laboratorio, kun kancero en tre progresinta fazo.



Prof. Masterson malfermis kaĝon. Li eltiris el ĝi malgrandan kobajon kiu aspektis tre ege malsana.

Laŭ vi povas vidi, Prof. Hardin, jen kobajo kun tre progresinta tumor en la vertebra kolumno.

Jes! Tre progresinta. Ĝi apenaŭ havas eblon supervivi.



Tiam, Prof. Masterson injektis tiun verdan preparaĵon al kobajo.

Kaj nun, la nekuracebla tumor, malaperos!!

Sed, tio povas okazi nur post kirurgia operacio!



Kirurgia operacio sukcesus demeti nur parton de la tumor, sed ĝi ne malaperus komplete. Kun mia formulo ĝi ja malaperos tute.

Sed.. kiel?



Hugo verŝis kelkajn gutojn de la preparaĵo super la dorson de la kompatinda kobajo.

Rigardu, Profesoro!

Mi ne povas kredi tion! La tumor malgrandiĝas!



Ambaŭ profesoroj rigardis tion atente. Iom post iom la vertebra kolumno de la kobajo resaniĝis.

Nekredeble, doktoro! Via formulo estas granda sukceso.

Jes, vere! Mi riĉiĝos kiam mi vendos la formulon. Ĝi kapablas malgrandigi ĉion.



La preparaĵo entenas izotopojn de uranio, kiuj kapablas redukti spacon inter molekuloj. Do kiam tio okazas, tutaj korpoj kaj objektoj malgrandiĝas. Temas pri simpla eltrovo.

Ŝajnas miraklo!

Hugo, jen la teo



Lasu ĝin tien! Damne!
Kio estas tiu fumo?

Mi pensis, ke estus
pli agrable trinki
varman tason da teo.



Mi pensis, mi pensis...
Vi ne bezonas pensi!
Mi petis al vi
"malvarman teon"!!!
Male, vi alportas du
tasojn da varma
teo!

Jes
Hugo.

Humm!
Profesoro
Masterson.
Mi devas
jam foriri.



Idioto! Ĉu
vi vidis?
Mia
gasto
ĵus
foriris pro
via kulpo !!

Ho!
Mi
multe
bedaŭras.

Neniu
problemo.
Mi nun de-
vas doni
lecionon
en la uni-
versitato.

Prof. Hardin foriris kaj tiam
Hugo lanĉis aĉajn vortojn al
sia edzino.

Azena virino!
Mi devus
forĵeti vin
en rubujon.

Ne, Hugo ne!
Ne aŭdacu
bati min!



Fine, Hugo batis ŝian vangon.
Ŝia haŭto ruĝiĝis tie, kien la
batoj ĵus falis...

Kion vi pensas fari? Vi meritas
eĉ ne la domon kie vi loĝas. Sen
mi, vi loĝus sur-strate. Tie
vi devus esti. Nun, foriru
vi tuj!

Ne
batu min!



Kiam Marta, ploreme, eliris el la laboratorio,
Hugo denove absorbiĝis en sia formulo.

Se kelkaj gutoj de la preparaĵo kapablas redukti
tumoron, do, per granda kvanto oni povus
malgrandigi grandan korpon.



Tiam Hugo plenigis injektilon per granda kvanto
de sia formulo. Poste li decidis preni novan
kobajon el kaĝo, kiam...

VEEEEE !!!



... li stumblis kaj koliziis kontraŭ la teo-tablo. Li veis kiam li sentis pikon de la injektilo sur sia brusto.

Mia Dio! Mia Dio! Mi injektis la formulon al mi mem. Marta!! Marta!!



Hugo ekmalgrandiĝis rapide. Li troviĝis sur la teo-tablo. En tiu sama momento, Marta eniris en la laboratorion, tamen li estis tre malgranda, li estis ĉirkaŭgita de tasoj, kuleroj, teleroj...

Hugo, kie vi estas?

Marta, mi estas ĉi tie!
Ĉu vi ne aŭdas min?



La voĉ-kordoj de Hugo tiam estis tre malgrandaj kaj ili produktis ne-aŭdeblajn sonojn.

Ŝi demetos la teo-tablon. Mi supreniros sur la kuleron, ĉi tie ŝi vidos min.



Hugo supreniris en la kuleron. Tie li svingis siajn brakojn kun la celo altiri la atenton de Marta.

Stulta virino. Ŝi ne vidas min. Jen mi !!!



Sed Marta profitis la momenton por prepari al si dolĉan kaj varman tason da teo. Ŝi prenis kuleron.

Marta, ne!!
Ne trinku min!!
Ne!!



Hugo luktis kontraŭ la likvaĵo, poste li alproksimiĝis al la lipoj de Marta kaj li eniris en kaskadon.

Mia Dio!
Ŝi glutis min!!



Hugo klopodis alproksimi sin al la uvulo, sed vane. Li estis tre malgranda kaj li ne sukcesis teni sin ĉe la gorgon. Li ekfalis en la nigran stomakon de sia edzino.

AAAAA !!!!



La defalo estis dolora. Hugo batiĝis kontraŭ la ezofago de Marta, krome Hugo fariĝis pli kaj pli malgranda.

Ve! Mi ne povas spiri!

Fine, Hugo falis en la stomakon de Marta, tuj ĝi produktis sukon kiu ekbruligis lin.

Ho! Acida gastrasuko, ĉi tio estas tre danĝera!

Post impulso, li eniris en mallarĝan tubon, tie nur obskureco.

Ve! Mi estas nun ĉe ŝia maldika intesto. Kio okazos nun?

Malpliĝo daŭriĝis, tiam li eniris en sekcion de la maldika intesto rekte ligita al miloj da kapilaraj anĝioj.

Ho! mi estos sorbita kaj mi eniros en la sango-fluon.

Pere de osmoza procezo Hugo pasis de la intesto en la sango-fluon de Marta. Tie li eltrovis ion.

Ho! Marta estas trafita de tuberkulozo. Pro tio ŝi estas tiel pala kaj febla.

Hugo evitis la danĝeran bacilon.

Dank'al Dio, ŝajnas ke la malpliĝo jam finiĝis.

Tamen, subite io aperis inter la ruĝaj globuloj, fagocitoj pretaj detrui mikrobojn ekĉirkaŭis lin.

Mia Dio! Blanka globulo preta elimini min!

Tiu blanka korplusko klopodis senmovigi lin. Hugo luktis kontraŭ li per rapidaj movoj.

Ve! Mi ne povas antaŭeniri, ruĝaj globuloj batas min fojon post fojo.



Rapide, la blanka fagocito ĉirkaŭis kaj senmovigis lin.

Mi ne sukcesas eskapi!



Iom post iom la blanka globulo venkis kaj Hugo senmoviĝis.

Kaptita! Dio helpu min!



Malrapide, la blanka korpusklo strangolis profesoron Masterson. Lia korpo disiĝis, liaj ostoj, liaj muskoloj, liaj vejnoj kaj arterioj displitiĝis en la acidan blankan korpusklon, kies celo estis detruiri ĉiujn fremdajn korpojn penetrintajn en la organismon. La sekva paŝo: forigi lin.



Apude, la loko kie Hugo trovis sian finon. Temis pri la vizaĝo de Marta, ankoraŭ red-kolora pro la bato lanĉita de ŝia edzo. Marta sentis, ke larmeto eliris el ŝia okulo, ŝi tuŝis ŝian ankoraŭ dolorplenan vangon.

Jes, Hugo pravas, mi povas iri nenien. Mi devas akcepti liajn riproĉojn kaj punojn... ĉar kion mi povas fari?



nun ni

junularaj paĝoj



Estudiantes del IES Almenara de Vélez-Málaga viajan con el esperanto

Alejandro Pinos y Yousef Hamdi, estudiantes de 2º de Bachillerato del IES Almenara, han participado en un seminario internacional sobre "Migraciones y Derechos Humanos" en Italia, con los gastos de viaje y alojamiento cubiertos gracias al esperanto, idioma que se lleva impartiendo con gran éxito en este centro escolar como asignatura optativa desde el año 2019.

Alejandro repite por segunda vez en un encuentro internacional de este tipo, mientras que Yousef se estrena en un encuentro esperantista a nivel internacional. Así que para conocer cuál ha sido la impresión de los dos hemos decidido hacerle una entrevista para esta página juvenil de NUN NI:

¿Yousef, cuándo y dónde tuvo lugar el evento?

Tuvo lugar en la semana del 27 de marzo al 2 de abril en un pueblo enclavado en las montañas al norte de Italia, llamado Serrada de Folgaria.

¿Cuántos jóvenes participaron y de dónde venían?

Aproximadamente éramos 22 jóvenes de distintas nacionalidades, había franceses, belgas, alemanes, italianos, españoles, suizos, polacos y mexicanos, todos ellos residían en Europa.

¿Te desarrollaste bien en esperanto?

Al principio me costó un poco por los nervios, pero apenas unas horas después ya me integré, aunque todos o la gran mayoría de ellos tenían un buen nivel de esperanto. A lo largo de los días fui mejorando y aprendiendo nuevas palabras.

En este momento interviene Alejandro, que nos dice:

Yo ya había participado en un evento anterior en verano y el oído ya lo tenía hecho a que me hablasen de forma fluida, creo que con este encuentro lo he terminado de desarrollar y me gustaría tener más vocabulario para hablar con más fluidez.

¿Creéis que si en lugar de esperanto hubierais aprendido durante el año pasado otro idioma, por ejemplo alemán o portugués, habríais sido capaces de desenvolveros igual de bien?

Yousef: *No, porque el esperanto es una lengua que es más fácil de estudiar y de hablar, además tiene una gramática mucho más simple que otros idiomas, que si la dominas puedes formular las frases que quieras y hablar con fluidez.*

Alejandro: *De ninguna manera, en un curso y en esta semana en Italia y mi anterior participación anterior en un evento esperantista en verano, creo que he conseguido un nivel similar al que tengo de inglés, con mucho menos esfuerzo. Creo que si en segundo de bachillerato hubiera salido la optativa, la mayoría habríamos conseguido este año un nivel suficiente para hablar fluidamente.*



Afiŝo de la seminario

¿Creeis que vuestro nivel lingüístico ha mejorado?

Yousef: *Sí, el avance lo noté a lo largo de la semana que estuve en el seminario, sobre todo al hablarlo todo el día con distintos esperantistas.*

Alejandro: *Sin ninguna duda, el esperanto al recoger palabras similares a otras lenguas europeas si me decidiera por aprender otros idiomas europeos, ya tendría una base de vocabulario que me ayudaría mucho a acelerar mi aprendizaje.*



De la 27-a de marto ĝis la 2-a de aprilo okazis en Serrada de Folgaria (Italio) seminario pri Migraĵoj kaj Homaj Rajtoj, organizata de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

¿Qué os ha aportado el esperanto?

Yousef: *Después de este seminario siento que me ha cambiado y que me ha ayudado a conocer gente de muchos sitios y nuevos amigos.*

Alejandro: *Me ha abierto la mente a nivel de conocer gente y de eliminar prejuicios sobre gente de otros países, así mismo de cómo son sus respectivos países. También me ha hecho ver que si de verdad le pones pasión a un idioma que estudias por vocación, y no por imposición, puedes llegar a tener un nivel bueno y comunicarte con gente que comparte esta pasión como tú.*

¿Qué tipo de formación recibíais, qué tipo de actividades hacíais y que habéis aprendido?

Yousef: *El horario era de 8 de la mañana a 6 de la tarde con descansos. Hacíamos distintas actividades en grupo bastantes interesantes, además de debates, dar opiniones, juegos, etc. Todo era muy interesante y no aburría.*

Alejandro: *Nos dieron una serie de charlas sobre inmigración y derechos de los inmigrantes, así como información detallada de los diferentes visados que hay y las dificultades de los inmigrantes combinado con actividades relacionadas con estos temas y era todo bastante dinámico. Una de las actividades que más me marcó fue una de ACNUR que consiste en ponerse en la piel de un inmigrante te tapaban los ojos y se interpretaba lo que sucedía si eras un inmigrante era la primera vez que se hacía y para mí fue bastante inmersivo así como impactante. He aprendido mucho sobre materia legal respecto a la inmigración y ha cambiado mi punto de vista sobre ella.*

¿Aprovechásteis para hacer turismo o alguna excursión?

Yousef: *Hicimos una excursión a Folgaria, fuimos a museos, recorrimos las calles y también disfrutamos de tiempo libre para ir donde quisiéramos.*

Alejandro: *Sí, fuimos al museo de arte contemporáneo de Rovereto la ciudad más cercana de Serrada y el último día de vuelta fuimos a Vicenza antes de ir al aeropuerto de Treviso para irnos a Málaga.*

Si hablas o te gusta el esperanto y tienes menos de 35 años colabora con:

Andaluzia Junulara Esperantisto-Uniĝo - AJEU

ajeu@esperanto.ac

¿Creéis que esta experiencia os ha ayudado a crecer y madurar como personas, que ahora sois más "desenvueltos" en la vida?

Yousef: *Sí, es la primera vez en la que viajaba solo sin la familia, y he tenido que hacer cosas por mí mismo con mi compañero durante el viaje, además hemos aprendido muchas cosas.*

Alejandro: *Creo que me ha ayudado mucho. He tenido que superar obstáculos durante el viaje junto a mi amigo Yousef, que no nos dejaran volar por que nos faltaba un papel, tuvimos que cambiar los vuelos y me desanimé totalmente, pero la verdad no me arrepiento de nada de haber seguido queriendo ir me lo he pasado superbién conociendo a gente nueva, planificando las rutas para volver al aeropuerto a tiempo y buscando un descanso para visitar algún sitio nuevo creo que este viaje me ha abierto la mente y realmente Italia al ser un país similar a España no ha sido mal escenario para hacerlo.*

¿Qué le diríais a quienes están pensando en elegir el esperanto como asignatura?

Yousef: *Les recomendaría mucho coger la asignatura, principalmente porque es una lengua más que aprendes, y es mucho más fácil que otras. También es una asignatura que te abre muchas puertas.*

Alejandro: *Que la escojan sin ninguna duda es una asignatura a largo plazo, aprender ahora para poder recoger los frutos en el futuro, aunque sea más difícil y menos chorra que otras que se ofertan te abre muchas puertas que las demás no, el esperanto es el único idioma por el que otra persona te va a ayudar por el simple hecho de hablarlo.*

¿Os gustaría seguir usando el esperanto y sus posibilidades? ¿Algún proyecto para el futuro?


Yousef: *Sí, me gustaría participar en otros seminarios o viajar con el esperanto, o con otros esperantistas.*

Alejandro: *Me gustaría seguir usándolo y seguir aprendiendo así como, en un futuro poder conseguir algún certificado de mi nivel como el B1 etc. A futuro si se diera el caso no me importaría seguir participando en proyectos europeos y de TEJO como estoy haciendo ahora.*

Si cada año va saliendo del Instituto más gente que lo habla ¿Creéis que podríais organizar algún tipo de peña para viajar, hacer eventos o actividades?

Yousef: *Me parece una propuesta interesante, para fomentar la lengua. Pero si no se llega a hacer con la gente con la que conoces, en distintos eventos organizan viajes y cualquier esperantista es bienvenido.*

Alejandro: *Creo que este sería mi mayor sueño dentro del mundo esperantista que se llegase a formar una asociación entre los jóvenes que vayamos saliendo del Almenara, yo creo que en unos años se podrá hacer y hacer un modelo similar a las otras asociaciones de jóvenes de otros países fomentando el esperanto en Málaga.*



***MATILDA* aperis en esperanto!**

Esperanto-Asocio de Britio eldonis la libron "Matilda" de Roald Dahl en la esperanta traduko de Tobiasz Kubisiowski.

Matilda estas brila infano kun magia menso. Tamen ŝiaj gepatroj opinias ŝin malsparo de spaco. Kaj ŝia lernejestro Fraŭlino Trunchull estas malica tirano, kiu opinias, ke ĉiuj infanoj estas putraj kaj aĉaj kaj devus esti enŝlositaj. Alvenis la tempo, kiam Matilda devas trovi la forton por ŝanĝi sian rakonton, kaj montri, ke infanoj povas esti eksterordinaraj...

La libro estas disponebla en esperantaj libro-servoj, retbutikoj kaj ankaŭ ĉe *Amazon* kun rekomendata prezo 10 £, proksimume 11,80 eŭroj.



Andaluza Kuirarto

La almeria "Tabernero"

Vegetal-fritaĵo, en la hispana *pisto*, estas bongusta maniero unuigi horto-produktojn kaj oliv-oleon. En Andaluzio, ĉiu vilaĝo ellaboras sian propran *pisto*, kvankam la plej konata troviĝas en la apuda regiono La Manĉo. En aliaj landoj ankaŭ ekzistas egalaj kuiradoj, kiel la franca *ratatouille*. Hodiaŭ ni parolos pri tipa vegetal-fritaĵo de la provinco Almerio, konata kiel *tabernero*. Rilate la nomon, ne temas pri tre klara afero, tamen preskaŭ ĉiuj fakuloj konsentas pri la deveno de la nomo el la vilaĝo Tabernas.

Jen la ingrediencoj:

- 1 cepo.
- 2 ajleroj.
- 4 tomatoj.
- 2 ruĝaj kapsikoj.
- 1 itala kukurbo.
- 1 melongeno.
- Salo.
- Nigra pipro.
- Oliv-oleo.
- Pano.



Oliv-oleo



Nigra pipro



Cepo



Ajlero



Tomatoj



Ruĝa kapsiko



Itala kukurbo



Melongeno



Salo

Pano



Kaj jen la preparado:

1) Distranĉu cepon en pecojn, agu same rilate ajlerojn sed en malgrandajn pecojn. Distranĉu ankaŭ kapsikon, post forigi ties tigon kaj semerojn. Metu ĉi tiujn vegetaĵojn ene de pato kun oliv-oleo. Fritu ĉion per malforta fajro dum 15 minutoj.



Dum 15 minutoj fritu malforte cepon,
ajlerojn kaj ruĝan kapsikon

2) Distranĉu en maldikajn lamenojn la italan kukurbon. Agu same rilate la melongenon, sed en malgrandajn kubojn. Aldonu ĉi tiujn vegetaĵojn en la paton.

4) Kiam ĉiuj vegetaĵoj aspektas malmolaj, aldonu distranĉitajn tomatojn. Aldonu salon kaj paprikon laŭ via deziro. Denove fritetu ĉion dum deko da minutoj, ĝis kiam tomatoj aperos dissolvitaj inter la ceteraj vegetaĵoj.



Verŝita la tomato, fritetu ĉion dum dek
pliaj minutoj.

4) Fine, ŝmiru abunde kelkajn pantraĉaĵojn per la frititaj vegetaĵoj.

Pli modernaj versioj de ĉi tiu recepto aldonas al la fritajo kubetojn da fromaĝo, viando-pecetojn aŭ eĉ fiŝaĵojn.



BONAN APETITON !



Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

Gasparilla, la sevila pirato.

Depost la jaro 1908 okazas en la usona urbo Tampo (ŝtato de Florido), la festivalo dediĉita al pirato *Gasparilla*, temas pri festo kie partoprenantoj ŝajnigas invadi la urbon en pirataj vestaĵoj. Do, kiu estis tiu *Gasparilla*?

José Gaspar verŝajne naskiĝis en la urbo Sevilo ĉirkaŭ la jaro 1756. Inter mito kaj realo, oni diras, ke temis pri fripono, kiu ekigis siajn kontraŭleĝajn aventurojn kiam li forrabis riĉan junulinon. Li ne sukcesis atingi elaĉeton de la mon-hava patro de la knabino, do José Gaspar estis kaptita. Pro la fakto, ke li ne plenumis sangan delikton, juĝisto proponis al li enkarcerigon aŭ soldat-servadon ene de milit-ŝipo. Kompreneble, li elektis ĉi tiun duan opcion.

Tiel, li enŝipiĝis en la ŝipo "Floridablanca", kies celo estis patroli en la Kariba Maro, tiutempe kaj la insulo Kubo kaj la ŝtato Florido troviĝis sub hispana suvereneco. Kvankam soldato sub la ordonoj de oficiroj en ŝipo, José Gaspar ne forgesis sian ruzan karieron, do, oni diras, ke li ŝtelis monon kiu apartenis



La pirat-ŝipo de *Gasparilla* estas ricevata ĉiujare ĉe la haveno de la usona urbo Tampo

al la mar-armeo. Tamen, la oficiroj malkovris lin, por eviti areston li organizis ekribelon en la ŝipo kaj li sukcesis. Tiam li estis 38-jaraĝa kaj naskiĝis tiam la pirato José Gaspar *Gasparilla*.

En sia agado kiel pirato, Gasparilla atakis ĉiujn ŝipojn navigantajn tra la Kariba Maro, ne gravis ĉu ŝipo estis hispana aŭ de aliaj imperioj. Laŭdire, riĉaĵojn atingitajn post ĉiu ŝip-sturmo li kaŝis en insulo, kiu nuntempe ricevis la nomon "Insulo Gasparilla". Homoj venkitaj dum la atakoj devis elekti, ĉu morti, ĉu eniri en la trupon de la pirato. Virinoj, kontraŭe, estis senditaj 51

en la insulo *Captiva*, kiu pro tiu fakto ĝi ricevis sian nomon.

Inter la famaj aventuroj de la andaluzia pirato Gasparilla, ĉu veraj aŭ ne, troviĝas la kidnapo de Josefa de Mayorga, filino de la vic-reĝo de Nov-Hispanio, regiono inkludanta Meksikon, Centr-Amerikon, Karibion kaj la sudon de Usono. Gasparilla postulis elaçeton por la liberigo de tiu junulino, sed ŝi fine mortis, kiam ŝi rifuzis seksan perforton de la pirato. Li pentis sian fiagon kaj li decidis entombigi la junulinon en la insulo *Useppa*.



Reklamo pri la Gasparilla Pirata Festo

Laŭdire, Gasparilla atakis kaj kaptis pli ol 400 ŝipojn, ĝis kiam en la jaro 1821, usona milit-ŝipo *USS Enterprise* detruis la ŝipon de la pirato. Oni diras, ke kiam Gasparilla fine troviĝis ĉirkaŭigita de malamikaj soldatoj, li preferis salti en la maron post krii: 52 "Gasparilla mortas pro sia propra mano, ne pro sukceso de malamikoj."

Kiel ĉiuj aliaj rankontoj pri piratoj, ankaŭ ĉi tiu historio pri José Gaspar Gasparilla kompreneble havas certajn kaj fantaziajn elementojn.

Tamen, tio kio estas tute certa estas la fakto, ke pli ol 400.000 homoj renkontiĝas ĉiujare en la "*Gasparilla Pirate Fest*" (Pirata Festo de Gasparilla) en la florida urbo Tampo.



Kasko de la uson-futbala teamo *Buccaneers* de Tampo

Ankaŭ la uson-futbala teamo Tampa *Buccaneers* (Bukaneroj de Tampo) portas kiel simbolon en sia kasko, vizaĝon de pirato, tiu bukanero kiu verŝajne naskiĝis en Sevilo meze de la 18-a jarcento.



Insuleto Gasparilla en Florida. Laŭdire la sevila pirato tie kaŝis trezoron



	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G
1								
2					■		■	
3				■				
4						■		
5				■				
6						■		
7			■					
8								

HORIZONTALALE

- Unu el la sep montetoj de Romo, sur kiu estis konstruitaj la Jova templo kaj la Citadelo.
- Grasa likvo de origino vegetaĵa, animala aŭ minerala. ■ Konsonanto, kiu estas la simbolo de ĉiuj reelaj nombroj. ■ Finaĵo de akuzativo.
- (Sen la lasta vokalo)* Nivelita peco de grundo, preparita por plantoj. ■ *(Inverse)* Konformi sin al tio, kion alia persono ordonas aŭ malpermesas.
- (Inverse)* Peco de tolo, de kiu unu flanko estas fiksita al ŝnuro, kaj kiun oni povas hisi k malhisi. ■ Prepozicio montranta fizikan proksimiĝon en iu direkto.
- Malagrabra grenkampa trudherbo, kies semoj estas venenaj. ■ Li kaj li.
- Devigi iun sorbi substancon stimulan aŭ stuporigan, kiu povas kaŭzi psikan kaj korpan dependecon. ■ *(Inverse)* Prefikso montranta la peredziĝan parencecon.
- (Inverse)* Nedifina pronomo, reprezentanta iun objekton, aferon, ideon ktp. ■ *(Inverse)* Reĝo de la hunoj.
- (Inverse kaj plurale)* Arbustoj kun ĝenerale alternaj, dustipulaj folioj kaj kun cumoj el blankaj, rozaj, ruĝaj, flavaj aŭ orangĝaj floroj.

VERTIKALE

- A. (*Plurale*) Feo, kun ofte petola humoro.
- B. Metafora parolo.
- C. Mekanismo, kiun oni movas per la piedo. ■ Verba finaĵo.
- Ĉ. Nedifina pronomo., reprezentanta iun objekton. ■ (*Akuzative*) Altirforto de tiu, kiu estas agrabla aŭ bongusta.
- D. Sur la tajlandaj aŭtomobiloj. ■ (*Inverse*) Prefikso esprimanta malestimon. ■ Instrumento, aparato.
- E. (*Inverse*) Elementa peceto. ■ Sur la aŭtomobiloj de Italio. ■ Sufikso almetebla al ĉiaj radikoj kaj esprimanta la efikon de ia kaŭzo.
- F. Sur la aŭtomobiloj de Luksemburgio. ■ (*Adverbe*) Voĉdono precize per kalkuleblaj objektoj. .
- G. (*Inverse*) Ĉefurbo de antikva regno, fama pro siaj muregoj, sia zigurato kaj la pendĝardenoj.



SOLVOJ AL LA KRUCVORTO DE LA PASINTA NUMERO

K	A	L	D	R	O	N	O
E	L	■	I	S	T	O	N
B	U	D	O	■	S	I	A
E	N	O	P	M	I	■	I
K	I	■	T	■	■	N	A
A	T	E	R	A	B	A	K
N	O	L	I	L	G	I	R
O	N	A	O	K	■	N	O

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio. Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi

La Asociación Andaluza de Esperanto es la organización que tiene como objetivo difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía. Se fundó en el año 1984 gracias a la iniciativa de esperantistas de las provincias de Málaga, Sevilla y Córdoba. Hoy pertenecen y colaboran con AEU esperantistas de toda Andalucía y también de fuera de ella.

Estraro

Prezidanto / Presidente:
Vicepresidente / Vicepresidanto:
Sekretario / Secretario:
Kasisto / Cajero:
Voĉdonantoj / Vocales:

Directiva

Ángel Arquillos López
Fátima Jiménez García
José M^a Rodríguez Hernández
M^a Dolores Torres Mateo
Jordi Lietor López
Juan García del Río
Carlos Spinola
Alejandro Burgos Escalante
Juan Díaz Casado

Poŝta adreso / Dirección Postal: C/ Ánfora 6 5º D 29013 Málaga (Hispanio)
TTT-paĝo / Página web: www.esperanto.ac
Tvitero / Twitter: [@AndaluzioEO](https://twitter.com/AndaluzioEO)

[Aliaj adresoj de la E-movado / Otras direcciones del movimiento esperantista:](#)

Federación Española de Esperanto: www.esperanto.es
Asociación Universal de Esperanto: www.uea.org





109-a Universala Kongreso de Esperanto



Aruŝo, Tanzanio
3 – 10 aŭgusto 2024

KONGRESA TEMO
Lingvo, homo kaj medio
por pli bona mondo